

Emile Grosjean-Maupin

Raporto pri Landnomoj

(1922)

Samtempe mi sendas la Raporton pri landnomoj de Prof. Grosjean-Maupin kun la voĉdono de la Akademianoj. Mi esperas, ke vi aprobos la sintenadon de via Akademio, kiu nur celas la plei grandan eblan unuecon en la uzado de nia komuna lingvo. Ĝi estas la sola argumentado, kiu ni ne sukcesos atingi, se ni ne disciplinon, silenton, kaj ordon. Kelkaj Esperantistoj, ĉi tiuj lingvan uzantoj, ĉi tiuj principoj. Sed ili ne akceptas la principojn de

de l'Isle, allasas la konstruon de du aŭ tri ofte tre malsimilaj lingvoj. La fideleco al fundamentaj, eĉ Fundamentaj principoj ne estas sufiĉa garantio de unueco. Ĝin povas garantii nur la nepra fideleco al nia Zamenhofa Fundamento, kiel fundamento, sur kiu ni konstruas ĉiam pli plenan, riĉan lingvon. (*)

Kaj nun permesu al viane plu juna Prezidanto, al la blankbarba kunlaborinto de nia neforgesebla Hodler, ke, finante tiun ĉi cirkuleron, li turnu sin al vi kun paroloj de konkordo kaj de paco. Ni ĉiuj evitu zorge en niaj polemikoj, - cetero signoj de arda konvinko kaj vivo -, akre ataki persone tiujn, kiuj ne ĉiam same opinias, kiel ni! Ili ja estas Esperantistoj, kaj tiel sincere kiel ni deziras nur la venkon de lingvo, kiu nin ĉiujn superas. Kontraŭ la ĝenerala indiferenteco kaj ofta malamikeco ni restu unuigitaj. Tia estas la

<ea>

**Esperanto
Akademio**

Émil Grosjean-Maupin

Raporto pri landnomoj

(1922)

**Kun enkonduko
kaj komentoj
de
Bernhard Pabst**

**Esperanto-Akademio
Berlino 2016**

Propono por citado: „Landnomoj 1922 (2016-04), marĝena numero“
aŭ „LandN 1922 (2016-04), marĝena numero“

Atentigo pri la elektronikaj eldonoj de BK kaj BKB

La elektronikaj dosieroj en formato de *pdf* enhavas **ligilojn** (elektronikajn referencojn) al fontoj en Interneto, kiuj estas atingeblaj per simpla klako sur la substrekita teksto, se la komputilo estas konektata kun la komputila reto. **Ekzemplo:** Musklako sur la substrekita parto de la fontindiko „OGE Jan. 1910:2:7 (18), p. 202-228“ sendas al la skanaĵo de Oficiala Gazeto Esperantista de Januaro 1910, p. 202 en la retejo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW). Tie troveblas la unua paĝo de la „Listo de Propraj Nomoj“, proponataj de BEIN, MOCH kaj SCHRÖDER en 1910.

Grosjean-Maupin, Émil. Raporto pri landnomoj (1922). Kun enkonduko kaj komentoj de Bernhard Pabst. Berlino: Esperanto-Akademio 2016.

Stato: 2016-08-01 (formala rev. de la versio de 04-04). © Bernard Pabst 2016.

Kontakto: [bernhard.pabst\[ĉe\]gmx.de](mailto:bernhard.pabst[ĉe]gmx.de) (anstataŭigu „[ĉe]“ per „@“).

En sama formo aperis: Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Sep volumoj 2013-2015, vd. la superrigardon dekstre.

Ĉiuj volumoj estas senkoste elŝuteblaj de

<http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>.

Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto

(BK)

Superrigardo pri la volumoj

(Stato Apr. 2016)

N.	N.	Titolo / Enhavo	Mil.	Eld.	Rimarkoj
I.	1.	Bulonja Deklaracio, Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro kaj Ĝenerala Parto de Vortaro Oficiala	BD – A – FG – FE – VO	4a	Okt. 2015
II.	2.	Vortaro Oficiala – Listo de la Oficialaj Vortoj	VO	5a	Okt. 2015
III.	3.	Zamenhofa Uzado. Kelkaj Misinterpretoj	Z - Mis	1a	Antaŭe parte en BK I
IV.	4.	Akademia Dokumentaro	AD	1a	Kolekto de decidoj de la Lingvaj Institucioj ekde 1905
V.	5.	Akademia Nomaro	AN	1a	Membroj de Lingva Komitato kaj Akademio
VI.	6.	Lingvaj Respondoj	LR	8a	Kompletigita kaj rearanĝita
VII.	7.	Vortaro de Kabe 1910	Kabe	3a	Komentita kun listo de geografiaj kaj propraj nomoj de Kabe el 1910
VIII.	8.	Vortaro Esperanto-Franca de De Beaufront 1904	Beau		aperonta
IX.	9.	Jürgensen-Vortaro Esperanto-Germana 1904	ED 1		aperonta
Eksterserie					
BKB		Berlina Komentita Bibliografio de la Vortaroj kaj Terminaroj de Esperanto 1887-2014			Majo 2015
BVM		Berlina Vortaro de Mallongigoj kaj Simboloj en Esperanto			aperonta

Ĉiuj volumoj estas senkoste elŝuteblaj de

<http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>

Memore al Helmut Welger (1946-2008)
Iniciinto de Norma Esperantologio

Enkonduko

En Aprilo 1922 Théophile CART, la prezidanto de la tiama Lingva Komitato (LK) kaj de ĝia „Supera Komisiono“, nomita „Esperantista Akademio“ (AdE), sendis cirkuleron al la membroj de LK. Inter pluraj temoj, la LK-anoj aprobu decidon pri landnomoj, prenitajn de AdE surbaze de raporto de Émil GROSJEAN-MAUPIN, tiujare „Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro“.

Cirkulero kaj raporto neniam aperis en presita formo. Kiam la Oficiala Gazeto Esperantista (OGE) ĉesis aperi post la lasta numero de Jan. 1922 la Lingvaj Institucioj ĝis 1929 ne disponis pri propra bulteno por informi la esperantistan publikon pri siaj laboroj kaj decidoj. Ambaŭ dokumentoj pro tio estas skribitaj mane kaj multobligitaj. Ilia transskribo formas la kernon de tiu ĉi broŝuro.

La raporto daŭre estas interesa, ne nur pro historiaj kialoj. Ĝi jam resumas multajn argumentojn, ankaŭ poste disputatajn de esperantistoj denove kaj denove ĝis en nia epoko. Fakte la diskuto pri landnomoj estas „klasika“ temo de la esperanta vortaro kaj gramatiko, pri kiu aperis centoj da artikoloj dum la jardekoj. La moderna Akademio, refondita post la dua mondmilito en 1948, donis du „Rekomendojn pri Landnomoj“ en 1989 kaj laste en 2009. Verkante ilin, ĝi necese denove devis trakti demandojn, kiujn diskutas jam la raporto de GROSJEAN-MAUPIN el 1922 (kaj antaŭ ĝi la raportoj kaj proponoj de la „Subkomitato pri propraj nomoj“ (1907-1910) de LK).

Interesa la raporto ankaŭ estas pro la aplikita metodo. Ĝi nome preskaŭ komplete ignoras la devigajn preskribojn de la Fundamento de Esperanto (FdE de 1905, aktuala stato de 2007), kiel la Akademio solvu lingvajn demandojn. Ja la raporto referencas al multaj konsideroj kaj aspektoj, sed nur tre supraĵe kaj malprecize al la sole decidaj, nome tiuj de FdE. La raporto tial ankaŭ taŭgas kiel instru-materialo pri tio, kiel AdE *ne* argumentu.

Fine la diskuto pri la raporto estas bona ekzemplo por ĉiama problemo de AdE: Ĝia misuzo fare de (movadaj) politikistoj por iuj celoj ekster la demando de lingva ĝusteco, kiel tre klare montras la mallojala konduto de PRIVAT.

Komentoj de la transskribinto atentigas pri la metodaj mankoj en la teksto de 1922. Ili krome donas – tre koncizajn – klarigojn pri la multaj menciitaj personoj kaj okazaĵoj, al nuntempaj esperantistoj eble ne ĉiuj konataj. Fine ili atentigas pri la fono kaj kadro de la tiama diskuto, kiu instigis CART peti GROSJEAN-MAUPIN verki la raporton. Multajn pliajn detalojn oni trovas en la diversaj volumoj de la Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto (BK), pri kiuj vd. la superrigardon supre. Fakte tiu ĉi prilaboro estu rigardata kiel memstara ero de la materialoj, aperintaj en BK.

Kopion de la originalo, konservita en Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, afable sendis sinjoro Utho MAIER. Per tiu komentita transskribo mi dankas pro lia afabla subteno.

Berlino en Aprilo 2016

Bernhard PABST

Enhavo

I.	Cirkulero de Cart de Aprilo 1922.....	9
II.	Kelkaj komentoj pri la Cirkulero.....	11
III.	Raporto de Grosjean-Maupin	13
IV.	Kelkaj komentoj pri la Raporto.....	17
V.	Diskuto pri la Raporto en la Akademio.....	20
VI.	Kelkaj komentoj pri la Diskuto	22
VII.	Bazaj notoj pri la menciitaj personoj	24
VIII.	Postparoleto	26

Literaturo kaj Mallongigoj

Estas uzataj la samaj mallongigoj kaj citad-principoj kiel en BK, vd. la liston en BK IV – Akademia Dokumentaro.

Principoj de Transskribado

La originalaj tekstoj estas transskribitaj laŭeble precize tiel, kiel CART kaj GROSJEAN-MAUPIN permane skribis ilin, kun ĉiuj lingvaj apartaĵoj (ekz. arkaa lingvo-uzo k.t.p.). Kiel tuto la tekstoj pro tio estas malunuecaj. CART ekz. skribas „Esperantistoj“ majuskle, GROSJEAN-MAUPIN minuskle.

Niaj komentoj estas inter rektaj krampiloj („[...]“). Substrekoj estas originalaj, kursivoj (ekz. por latinaĵoj) estas niaj, ne tiuj de la originalo, same kiel vortodisigo ĉe la dekstra paĝorando estas nia. La simbolo „[W]“ enhavas ligilon (elektronikan referencon) al la koncerna paĝo de la esperanta Vikipedio. Nigraj numeroj ([1]) indikas la paĝojn de la originalo, grasaj nigraj numeroj ([1]) referencas al unuopaj alineoj en dokumento, ruĝaj numeroj ([1]) al niaj komentoj sub la transskribaĵo.

I. Cirkulero de Cart de Aprilo 1922

- 1 La manskribita cirkulero de CART al la membroj de LK estas datita je 1922-04-25. Respondo estis petita antaŭ fino de Majo, tiel ke la LK-anoj havis ĉ. monaton por reagi. Ĝi traktas jenajn temojn:
- [1] „**Oficiala Radikaro**“ (VOR): Sendo de la malneto kun peto je kritika trarigardo. Priskribon de VOR vd. en BK IV – Akademia Dokumentaro, en la ĉapitro „Kolekto de la Akademio“.
 - [2] **Landnomoj** (por –uj, kontraŭ –j): Sendo de la (tie ĉi transskribita, manskribita) raporto de GROSJEAN-MAUPIN pri landnomoj kun la decido de AdE kaj la peto ĝin voĉdone aprobi.
 - [3] **Statuto** („Regularo“): Reformo de la **rajto proponi** kandidatojn ne ŝajnas necesa al AdE.
 - [4] **Statutŝanĝo**: AdE deziras la rajton nomumi **korespondantojn**.
 - [5] **Membraro de LK**: Forstreko de ne plu aktivaj membroj, interesigo de kandidatoj, kiuj parolas „lingvojn, „ne sufiĉe aŭ ne jam reprezentataj“ (grekoj, japanoj, pli da germanoj).
 - [6] **Direktoro Teknika Vortaro**: Laŭ decido de AdE, ROLLET DE L'ISLE transprenas de CORRET.
 - [7] Alvoko al unueco kaj reciproka respekto.

Parizo, la 25an de Aprilo 1922

Kara Kolego, [1]

[1] La plenan liston de la oficialaj radikoj mi sendas al vi. [2] Tre danko mi estus, se vi bonvolus montri al mi la eblajn preserarojn (steleto forgesita aŭ troa k. t. p.). [3] Komprenoble ne temas pri ŝanĝo aŭ forpreno de jam regule oficialigitaj vortoj. Estas tre eble, ke unu aŭ alia ne plaĉas persone al vi, sed ni ne faru Penelopan laboron, detruante hodiaŭ la hieraŭan teksaĵon, sub preteksto, ke unu fadeno, cetere ne la sama por ĉiuj, ŝajnas malagraba aŭ ne taŭgas! [4]

[2] Samtempe mi sendas la Raporton pri landnomoj de Prof. Grosjean-Maupin kun la voĉdono de la Akademianoj. Mi esperas, ke vi aprobos la sintenadon de via Akademio, kiu nur celas la plej grandan eblan unuecon en la uzado de nia komuna lingvo. [5] Ni neniam forgesu, ke la plej grava argumento kontraŭ internacia lingvo estas, ke la unuecon ni ne sukcesos konservi. Ni pruvu la malon per necesa disciplino, silentigante niajn personajn gustojn aŭ preferojn.

Kelkaj Esperantistoj opinias, ke sufiĉas por konservi tiun lingvan unuecon, la fideleco al la Fundamentaj principoj. Sed ili ne atentis, ke tiuj principoj, kiel montris Sro Rollet de l'Isle, allasas la konstruon de du aŭ tri ofte tre malsimilaj lingvoj. [6] La fideleco al fundamentaj, eĉ Fundamentaj principoj ne estas sufiĉa garantio de unueco. Ĝin povas garantii nur la nepra fideleco al nia Zamenhofa Fundamento, kiel fundamento, sur kiu ni konstruas ĉiam pli plenan, riĉan lingvon. (*) [7]

[Piednoto en la originalo paĝofine:] (*) Ni ne parolu pri antaŭmilita kaj postmilita Esperanto, antaŭmilita kaj postmilita periodo. Por ni ĉiuj povas ekzisti nur unu Esperanto, la Zamenhofa, nur unu periodo – ĝis kiam oficiale la registaroj alprenos Esperanton – la Zamenhofa, propaganda! [8]

Prave D^{ro} Corret skribas: „Ni havas lingvon, ni ne faras lingvon“. Pli ĝuste, - kaj tion li tre bone scias, - se ĝin ne povas nek devas fari la lingvaj institucioj, ĝin faras efektive la uzantoj, sed sub la necesa kontrolo de la Akademio. En la Akademia Deklaracio [9], Prof. Grosjean-Maupin klare montris la specialajn kondiĉojn de internacia lingvo, kiuj necesigas tiun kontrolon, por eviti la disfalon en dialektojn. „La kontrolo de la Akademio, ne forprenante la liberecon de ĉiu Esperantisto, nek

barante la normalan, naturan kaj laŭnature internacian evoluadon kaj pliriĉigadon de la lingvo, tamen konservas ĝian severan unuecon ... La Akademio devas esti konstante helpanto, informanto kaj konsilanto de ĉiuj Esperantistoj, senlace rememorigante al ili la necesan disciplinon ..., ĉar, kiel skribis D^{ro} Zamenhof, la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene egale“. „Vivanta lingvo de vivanta popolo“, diris elokvente D^{ro} Privat. Tia ĝi estu por ni ĉiuj! Ĝin ni do respektu, kiel ni respektas nian nacian lingvon!

[3] Pri la reorganizo de la lingvaj institucioj, la Akademio unuanime opiniis, ke ne estas necese, ŝanĝi la laŭ la konsiloj de D^{ro} Zamenhof starigitan Regularon, kiu en § 6 donas al la naciaj kaj specialaj Societoj ĉiun necesan povon por prezenti kandidatojn. **[10]**

[4] Ĝi deziras havi la rajton, kiun la praktiko montris tre necesa, nomi Akademiajn Korespondantojn por gravaj lingvoj ne sufiĉe aŭ ne reprezentitaj en la Akademio. Ĉiuj korespondantoj, kompreneble, ne havus la rajton voĉdoni, **[2]** sed oni povus interkonsiliĝi oficiale kun ili pri lingvaj demandoj. Ili nombro ne superus la trionon de la Akademianoj (sekve maksimume 6). Ĉu vi konsentus, ke ilin la Akademio elektu, el escepto ekster la L. K., kaj ke, per tiu elekto, ili fariĝu L. K.-anoj? Mi rimarkigos, ke, ĉar tia escepto certe neniam superus du aŭ tri eminentajn esperantlingvanojn, tia konsento viaflanke tute ne povus esti danĝera, malpliigante la aŭtoritaton de la elektitaj L. K.-anoj. – Sed vi decidus mem!

[5] La Akademio aliparte opinias, ke pli bone estus, se proporcie la diversaj lingvoj estus pli ĝuste reprezentataj (ekzemple nun tro multaj Francoj, tro malmultaj Germanoj). Gravaj lingvoj, kiel la greka, mankas. Japanujo devas havi reprezentanton. **[11]** Sed la apliko de tiuj ĉi principoj estos ebla nur, kiam ni precize scios, kiuj estas ankoraŭ L. K.-anoj: kelkaj mortis, multaj malaperis aŭ neniam respondas. Ni devos do antaŭ ĉio starigi liston de la efektivaj L. K.-anoj. Konsekvence tiujn, kiuj ne respondos tiun ĉi cirkuleron kaj ne respondis la lastajn, la Akademio rigardos kiel propravole ekziĝantaj. Por restarigi la L. K. ne estas eble agi alimaniere. Ĉiuj certe tion komprenos. Nur post respondo, ni povos zorgi pri elekto de novaj L. K.-anoj, de Akademianoj kaj pri la starigo de sekcioj, ĉu en la Akademio, ĉu en la Lingva Komitato. **[12]**

[6] Post ekziĝo de D^{ro} Corret kiel direktoro por la scienca kaj teknika Vortaro [uskleco tiel], la Akademio unuvoĉe komisiis al S^{ro} Rollet de l'Isle la taskon organizi kaj direkti tiun ĉi fakon. **[13]** Tion li faros en plena libereco kaj la kontrolo de la Akademio konsistas nur en tio, ke, kiam, post serioza spertado, li estos stariginta liston de teknikaj vortoj, la Akademio ilin plene aŭ parte oficialigos. Al la scienculoj por starigo de teknika (mi ne diras: komunlingva) terminaro ni devos lasi plej grandan liberecon. Sur tiu ĉi kampo ili solaj estas kompetentaj. Ne dubo [tiel] tamen, ke iom post iom nia komuna lingvo, kiel ĉiuj naciaj lingvoj, grande kaj praktike profitos de tiuj ĉi sendependaj sciencaj laboroj; sed mi ripetas, iom post iom, preskaŭ senkonscie kaj ne per altrudo. **[14]**

[7] Kaj nun permesu al via ne plu juna Prezidanto, al la blankbarba kunlaborinto de nia neforgesebla Hodler **[15]**, ke, finante tiun ĉi cirkuleron, li turnu sin al vi kun paroloj de konkordo kaj de paco. Ni ĉiuj evitu zorge en niaj polemikoj, - cetere signoj de arda konvinko kaj vivo -, akre ataki kaj persone [mankas vorto aŭ „kaj“ troa] tiujn, kiuj ne ĉiam same opinias, kiel ni! Ili ja estas Esperantistoj, kaj tiel sincere kiel ni deziras nur la venkon de lingvo, kiu nin ĉiujn superas. Kontraŭ la ĝenerala indiferenteco kaj ofta malamikeco ni restu unuigitaj.

Tia estas la deziro de via Prezidanto kaj de ĉiuj liaj Akademiaj Kolegoj.

Mano en mano, antaŭen!

Via tre sindona

Th. Cart.

Prezidanto de la L. K. kaj de ĝia Akademio.

P.S. Bonvolu resendi la tie ĉi entenitan poŝtkarton kun viaj respondoj, kiel eble plej baldaŭ, kaj ĉiukaze (por la Eŭropaj landoj) antaŭ la 30a de majo.

II. Kelkaj komentoj pri la Cirkulero

- 2 [1] Kvankam estis ankaŭ kelkaj malmultaj virinoj inter la LK-anoj (ekz. Margaret BLAISE, Marie HANKEL k.a.), CART, laŭ la kutimoj de la epoko, alparolas la membrojn nur per „Kara Kolego“.
- 3 [2] La „Vortaro de la Oficialaj Radikoj“ (VOR) estas komuna verko de CART kaj GROSJEAN-MAUPIN. En presita formo (32-paĝa broŝureto) ĝi estis eldonita de la Esperantista Centra Librejo (Parizo) en Julio 1922 en la „Kolekto de la Akademio“, por ke ĝi povu esti prezentota al la 14a Universala Kongreso en Helsinko en Aŭgusto (UK 14, 1922). Malgraŭ la erariga nomo, VOR *ne* estas fidinda kolekto de la vortoj oficialaj, do de la vortoj troveblaj en FdE (1905), OA 1 (1909), OA 2 (1914 / 1919) kaj OA 3 (1921), sed miksaĵo inter tekstoj „oficialaj“ kaj „privataj“ en la senco de la Antaŭparolo al la Fundamento (A 3). Pli detalan priskribon de VOR vd. en BK IV, en la ĉapitro „Kolekto de la Akademio“.
- 4 [3] Per „steletoj“ VOR (malprecize) indikas, ke vorto estas trovebla en FdE laŭ stato de 1905 (ekz. * konsider’, * konsil’ k.t.p.). Detale vd. nun en BK II – Vortaro Oficiala.
- 5 [4] „Penelopa laboro“: La frazo eĥas la (misan) opinion de CART, ke Oficialaj Aldonoj estas ŝanĝeblaj de LK. Tio estas malĝusta. La Antaŭparolo klare preskribas: „...ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidis *pligrandigi* (neniam *ŝanĝi!*) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj ... (A 10.4 – kursivoj en la originalo). Per oficiala aldono al FdE, la vortoj aldonitaj ekhavas la saman statuson de netuŝebleco, kiel la vortoj, kiuj estis en FdE jam en 1905 („...ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin [la novajn vortojn] en la vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento » (A 7.2 – kursivon en la originalo, substrekoj niaj). – En la antikva greka mitologio, Penelopo estas la fidela edzino de Odiseo. Por rifuzi amoremulojn ŝi pretekstis, ke ŝi devas teksu mortotukon por sia bopatro. La dumtage teksitan tukon ŝi nokte denove malfaris, por daŭre havi la pretekston por defendo de sia edzina fideleco.
- 6 [5] „Raporto pri landnomoj“: La dokumento tie ĉi transskribita. – „via Akademio“: Laŭ la en 1922 aplikebla „Krakova“ Regularo (statuto) de 1912, AdE estis „Supera Komisiono“ de LK. La (en 1922 13-persona) AdE proponis al la ĉ. 80-100-persona LK, kiuj povis aŭ „aprobi“ aŭ resendi al AdE por denova konsidero. – „povas aprobi“: Cart uzas la esprimon „aprobi“ tie ĉi en la ĝenerala signifo de „konsenti“, ne en la teknika de art. 22 Regularo 1912 („**22.** [1] La decidoj de la Akademio, kiuj koncernas oficialigon de lingvaj novaĵoj, estas konigataj al la anoj de la Lingva Komitato, por konsulto. ...). Ĉar ne temas pri „lingva novaĵo“, sed male pri la rekomendo daŭrigi kiel nun, LK ne devis decidi; Cart simple nur informas ĝin pri decido farita de AdE. – „la plej grandan eblan unuecon“: Lingva unueco estas la plej prioritata celo de FdE, vd. A 1.1 kaj multloke (detale en BK I – Antaŭparolo): „Por ke lingvo internacia [...] havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, - [...]“ (A 1.1). CART aplikas la ĝustan, nome la Fundamentan kriterion.

- 7 [6] „kiel montris Sro Rollet de l'Isle“: CART aludas al la ampleksa raporto „Konsilaro“ (1910) de ROLLET DE L'ISLE, kiu ĵus transprenis la gvidadon de la Akademia Sekcio pri la scienca kaj teknika vortaro de CORRET. Sama aludo („majstra Konsilaro“) ankaŭ fine de la raporto de GROSJEAN-MAUPIN, vd. malsupre. – Rollet de l'Isle, Maurice. Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj. Raporto starigita de la Scienca kaj Teknika Komisiono de la Scienca Asocio Esperantista. En: Internacia Scienca Revuo Nov. 1910:7:83, p. 279–295 kaj Dec. 1910:7:84, p. 311-334.
- 8 [7] „fundamentaj / Fundamentaj principoj“: La ŝanĝo de la uskleco tiel en la Antaŭparolo (1905). Minuskle ĝi signifas „bazaj, ĝeneralaj principoj de Esperanto“, majuskle „principoj preskribitaj en la verketo nomita ‚Fundamento de Esperanto‘, precipe en ĝia Antaŭparolo“. La Antaŭparolo parolas pri „ideoj“: „La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, ... (A 11.1).
- 9 [8] Aludo al la Fundamento: „Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj ...“ (A 1.2). – „la Zamenhofa, propaganda periodo“: Diversaj artikoloj de Cart pri lia koncepto de la evoluo de Esperanto estas represitaj en: Vortoj de profesoro Th. Cart, eld. de GRENKAMP (1896-1943) kaj René DE LAJARTE, Jaslo [Pollando]: Eld. „Esperantista Voĉo“ [t.e. GRENKAMP] 1927, repr. Vieno: Pro Esperanto 1990.
- 10 [9] „Akademia Deklaracio“: Pri la „Difinoj kaj devoj de la Esperantistaro kaj de la Lingvaj Institucioj“ de Dec. 1920, vd. en BK IV – Akademia Dokumentaro. La dua parto estas speco de gvida koncepto pri si mem, de ĝenerala principaro de LK kaj AdE (*Leitbild*) kaj respondas la demandojn „kiu ni estas?“, „kion ni volas?“, kiel ni laboru?“.
- 11 [10] „Regularo“: La tiama nomo de la statuto. En 1922 estis aplikebla la Regularo de 1912 / 1914, tekstojn vd. en BK IV.
- 12 [11] Unu el la „eternaj“ kritikoj kontraŭ LK kaj AdE estas, ke ĝi ne sufiĉe „juste“ reprezentas la esperantistojn, ke iu grupo superpezas aliajn (tie ĉi: „tro da francoj, maltro da germanoj“, sed alitempe ankaŭ „tro da burĝoj, maltro da laboristoj“, „maljunuloj / junuloj“, „viroj / virinoj“, „eŭropanoj / ekstereŭropanoj“ k.t.p., historiajn ekzemplojn vd. en BK IV, ĉap. „Kritiko“). – „Japanujo devas havi reprezentanton“: Tiun postulon precipe PRIVAT advokatis. – El la perspektivo de FdE ĉiuj tiuj kategorioj ne gravas, sed nur tiu: „... pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la *fundamenton* de nia lingvo“ (A 10.2; samsence en A 5.4).
- 13 [12] Bazo de la anoncitaj eksigoj estis § 9 Regularo 1912, vd. en BK IV.
- 14 [13] Pri la fono de tiu ŝanĝo en la posteno de la Direktoro pri la Teknika Vortaro vd. en BK IV.
- 15 [14] „iom post iom“: La de CART substrekita „iom post iom“ esprimas lian koncepton de „evolucio, ne revolucio“, kiu estas la Zamenhofa, kaj kiun tiu multfoje denove kaj denove ripetis, ekz.:

LR 152 B (1908): ... Nur por gardi nian lingvon kontraŭ anarĥio de la flanko de apartaj personoj, nia lingvo havas sian plej senpartie elektitan kaj el plej kompetentaj personoj konsistantan kaj konsistentan Lingvan Komitaton, por kiu ĉiu havas la rajton prezenti sin kiel kandidaton kaj kiu, dependante de neniuj mastroj, havas plenan rajton kaj plenan povon esplori kaj prezenti al la sankcio de la esperantistaro ĉion, kion ĝi volas. La Bulonja Deklaracio malpermesas nur, ke apartaj personoj rompu la lingvon *arbitre*. Ĝi estas kreita nur por gardi la ekstreman necesan *kontinuecon* en nia lingvo; ... [PVZ 8, 1980, p. 294; mankas en la 7a eld. 1990, estontece en BK VI – Lingvaj Respondoj (aperonta)].

- 16 [15] „blankbarba kunlaborinto de ... Hodler“: La 67-jara CART alludas al la sviso Hector HODLER (1887-1920) [W], kunfondinto de UEA (Apr. 1908) kaj multjara redaktoro de ĝia gazeto *Esperanto*. HODLER mortis du jarojn antaŭe en aĝo de nur 33 jaroj je la naskiĝtago de CART (31a de Marto). Kunlaboro do eblis – jen la mesaĝo de CART – ne nur inter junulo kaj maljunulo, kvazaŭ inter (spirita) patro kaj filo, sed ankaŭ inter influhava pledanto por landnomoj je –i (HODLER) kaj la plej decida defendanto de landnomoj je –uj (CART). Kp. ankaŭ la piednoton de Cart pri „antaŭmilita“ (-uj) kaj „postmilita“ (-i) Esperanto. Fakte la tuta raporto fariĝis – el la perspektivo de CART – necesa nur, ĉar HODLER (kun apogo de PRIVAT) dum la unua mondmilito („malfidele“) ŝanĝis la uzadon de la landnomoj en la revuo *Esperanto* de UEA de la tradicaj formoj je –uj al la „junaj“, „novgeneraciaj“ je –i. Pro tio GROSJEAN-MAUPIN unue kaj aparte detale kritikis la pozicion de HODLER, vd. tuj.

III. Raporto de Grosjean-Maupin

- 17 Sekvas la transskribaĵo de la raporto. Bazajn notojn pri la menciitaj personoj vd. je la fino de la broŝuro. La ruĝaj numeroj sendas al niaj komentoj malsupre.

[3]

Raporto de Prof. Grosjean-Maupin

Kara sinjoro Prezidanto,

Vi petis de mi tute objektivan kaj pure sciencan raporton pri la landnomoj. [1] Jen ĝi estas:

Pri la landnomoj kaj popolnomoj

Akceptinte la malfacilan taskon, kiun komisiis al mi la Prezidanto de la L. K. [CART] kaj profitinte ne nur la dankindajn raportojn, kiujn mi ricevis el multaj L. K.-anoj kaj el [tiel] kelkaj aliaj esperantistoj, sed ankaŭ antaŭajn artikolojn kaj verketojn, mi provos apliki objektivan senpartian metodon al la demando pri land- kaj popolnomoj.

Por gvidi nian esploradon ni antaŭ ĉio bezonas, observinte la faktojn, serĉi la ĉefajn kondiĉojn, kiujn devas plenumi taŭga solvo de la demando. Tiamaniere ni starigos ĝeneralajn kaj nerigidajn principojn aŭ, pli ĝuste, ni montros gvidajn dezirindajn, pri kiuj espereble ĉiuj akceptos konsenti. [2] Ni do devas rimarki, ke:

1^o) La landnomaj kaj popolnomoj radikoj estas efektive „kvazaŭ propraj nomoj lernotaj, kiel la familiaj nomoj“ (Christaller), kaj ili staras „ekster la Fundamento“ (Christaller, Aymonier, Eyquem, Matton, Scott). (*) [3]

(*) [Piednoto en la originalo] Ne samopinias tamen, kiel sro Christaller k. c., multaj Esperantistoj, kiuj sin apogas sur: Ekzercaro § 40 (*in fine*) kaj Universala Vortaro (U. V.). [4]

2^o) El tio sekvas, ke same, kiel oni ne rajtas trudi al iu formon aŭ prononcadon de lia propra nomo, kiu ne plaĉas al li, „neniu instituto rajtas trudi nomon al landanoj, kiuj preferas alian nomon“ (Christaller). Oni do estis tre prava, forigante la nomon *Svisio*, kiu ĝenerale malplaĉis al la Svisoj, kaj anstataŭigante ĝin per alia formo; oni certe povus akcepti la formojn *Itali-o*, *Rusi-o*, *Germani-o*, *Aŭstri-o* pro ilia sufiĉa internacieco [5], se ili plaĉas al la respektivaj regnantoj, sed la vorto *Franci-o* ne estas akceptinda, ne nur ĉar ĝi ne estas sufiĉe internacia, sed precipe ĉar ĝi malplaĉas al tre multaj Francoj. Samo estas pri multaj vortoj, kiujn oni rajtas formi tute regule, kvankam maltaŭge per la helpa radiko *Land'*. „Estas pli bone uzi ankoraŭ *Italujo*, ol aprobi la ĝeneralan uzon de *Itallando*, ĉar *Land* estas teŭtona finiĝo, tre riproĉinda pro sia longeco, malbeleco, malinternacieco“ (Meazzini). [6]

3^o) Ideo de lando estas nature tre malsimpla demando, formita el multaj diversaj, materiaj kaj moralaj elementoj; ĉiu landnoma radiko sugestas al nia spirito ne nur la ideon pri la geografia teritorio mem, pri la montoj, riveroj, diversaj regionoj, urboj, pri la diversaj produktoj, riĉaĵoj, monumentoj, kuriozaĵoj, k. t. p., sed ankaŭ samtempe pri la nacioj, la enloĝantoj [ĉe Z simple: loĝantoj], la naciaj karakteroj, la nacia lingvo, la institucioj, fine pri la eminentaj homoj, la gloraĵoj kaj la tuta historio de la nacio“ (Eyquem). [7]

4^o) Tian kompleksan ideon elvokas la landnomaj kaj popolnomaj radikoj por si mem, eĉ ne aldonante ian landan aŭ anan sufikson. Sekve „la plej grava kaj malfacila afero estas ne la elekto de ia sufikso, sed la elekto de la radiko“ (Eyquem). Por elekti la taŭgan radikon oni kompreneble uzos la metodon uzitan por trovi la radikojn de la komuna lingvo, t. e. oni kolektos la nomojn uzitajn en la ĉefaj naciaj lingvoj, kaj oni elektos la plej internacian radikon, donante la plej grandan influon al la nacia formo, kondiĉe ke ĝi estu skribita en la latina alfabeto“ (Rollet de l'Isle). [8]

5^o) La historia scienco kaj la etnografio instruas al ni, ke, pro la multegaj migradoj de gentoj kaj pro la miljara intermiksiĝo de malsamrasaj individuoj, la rasoj en la nuna tempo kaj jam de longe apenaŭ ekzistas kaj la ideo de raso ne plu havas precizan rilaton kun la ideo de nacio. Raso estas io ne distingebla kaj nedifinebla. Tiu, kiu nune parolas pri angla, belga, dana, franca, hispana raso aŭ gento, parolas pri „mito“; la plejmulto el tiuj, kiujn oni kutime nomas Germanojn, ne estas germanrasanoj, sed germanlingvanoj. Kontraŭe, oni povas ĉiam facile distingi kaj precize difini, eĉ se ĝiaj limoj ŝanĝiĝas, la politikan kaj geografian teritorion. [9]

6^o) Estas precipe grave kaj dezirinde, por la facileco [10] de la lingvo, [4] ke la solviga respondo, ĝenante kiel eble malplej la ĝeneralajn kutimojn de la naciaj lingvoj, tamen prezentu unusolan, senesceptan formadon aŭ almenaŭ plej simplan procedon. „Reguleco estas nepre dezirinda“ (A. Ŝefer); estus dezirinde, ĉefe pro la neeŭropaj popoloj, ke oni povu atingi reguligon ...; la plej bona solvo estus certe tiu, kiu vere kontentigus la ĝeneralan efektivan bezonon al unueco, reguleco kaj internacieco“ (Privat) [11]. Cetere, reguliĝante kaj unuformiĝante, la lingvo Esperanto obeos la saman naturan leĝon de evoluado, kiujn la plej aŭtoritataj nunaj lingvistoj kaj aparte la mondfama Profesor Meillet [12], konstatas ĉe la naciaj lingvoj, kiuj konstante emas kaj pliproksimiĝas al plisimpliĝo kaj unuformiĝo.

Utiligante la supre diritajn gvidajn rimarkojn, ni nun ekzamenas la diversajn eblajn solvojn de la demando [13]. Ekzistas nur ses eblaj procedoj:

1^o) uzi sufikson jen por devenigi la landnomon el la popolnomo, jen inverse;

2^o) uzi sufikson nur por la landnomo;

3^o) uzi sufikson nur por la popolnomo;

4^o) uzi paralele du sufiksojn, devenigante per ili la landnomon kaj la popolnomon el neŭtrala radiko;

5^o) uzi neniun sufikson, uzante du malsamajn radikojn;

6^o) uzi neniun sufikson, uzante nur saman radikon.

I.) La unuan duoblan procedon sekvis Zamenhof [14]. Oni povas riproĉi al ĝi, ke ĝi estas malsimpla kaj ke ĝi en multaj okazoj tute kontraŭas al la historia kaj fakta realeco aŭ al la nacilingvaj kutimoj. Sro Hodler rimarkigas, ke estas maltaŭge derivigi *Italujo* el *Italo*, *Egiptujo* el *Egipto*, *Portugalujo* el *Portugalo*, *Japanujo* el *Japano*, ĉar „en ĉiuj lingvoj oni uzas la inversan procedon“. La sistemo proponita de Sro Hodler ne estas malakceptinda pro tio, ke ĝi anstataŭigas iun sufikson per alia, sed pro tio, ke ĝia proponanto preferis „konservi la nunan duoblan procedon“, kvankam li sincere konfesas, ke tia duobla procedo prezentas gravan

maloportunaĵon, ĉar neniam „oni povas scii kiam oni devas derivigi la landon el la gento aŭ inverse“. Dirante, ke, ne celante la „ŝanĝon de la nuna procedo, li tamen celas ĝian ‚reguligon‘, Sro Hodler kredigas, ke lia propra sistemo povas efektiviĝi la dezirindan regulecon; bedaŭrinde oni devas konstati, ke li efektive ne sukcesis montri certan regulon pri diferencigo de la derivmaniero kaj ke li kontentiĝas proponante nur la absolutan forigon de la laŭvola, tute korekta kaj tute ne ĝenante kvazaŭsufikso *Land* kaj la anstataŭigon de la Fundamenta sufikso *Uj* por alia nova sufikso, kio tute ne solvas la solvindan punkton, nome la duoblecon. Krom la duobleco de formado Sro Hodler devas ankaŭ konfesi la neceson de esceptoj, kiel *Nederlando*, *Finlando* [tiel, unu -n-], *Anamo* [iama nomo de Vjetnamio], *Argentino*, *Tonkino* [iama franca protektorato en la nordo de nuna Vjetnamio], *Brazilo*, *Maroko*, k. t. p.

Certe estas, ke la uzo de la landnomo sufikso *-l'*, oni kelkfoje ricevas vortojn, kiuj havas la saman fizionomion, kiel la nacilingvaj landnomoj; sed oni povas pli simple atingi la saman profiton, elektante sensufiksajn radikojn finiĝantajn per *l'*. Cetere la finiĝo *lo* estas konsternanta, kontraŭkutima, nek nacia, nek ĝenerale internacia en vortoj kiel *Francio*, *Egiptio*, *Portugalio*, *Ĉinio*, k. t. p. Kiel ajn mi rompas al mi la kapon, mi tute ne komprenas la utilon anstataŭi la Fundamentan sufikson *Uj* ĉe landnomoj ... Ĉu iu povas serioze pretendi, ke ekzistas eĉ la plej malgranda danĝero de miksiĝo inter *Rusujo* kaj *Supujo*? ... Fonetike *-lo* plioftigas la akcentitajn Isonojn [tiel], da kiuj nia lingvo jam nun havas sufiĉegon. Komprenoble, ĉe vere praktika besono [tiel, legu: bezono] oni ne atentu la fonetikon, estetikon aŭ belsonecon, sed sen neceso oni ne unutonigu la lingvon ... Plie oni ne malofte dubas, ĉu *lo* estas [„]efektive sufikso aŭ natura finiĝo de landnomo“ (H.M. Scott).

Dezirante kompletigi la neplenan Hodler'an liston kaj precipe malaperigi la esceptojn, Sro Meazzini, en sia ĵus aperinta, cetere tute rekomendinda Esperanta-Itala vortaro [15], proponas ankaŭ aliajn multajn strangajn, malinternaciajn, senutile longegajn formojn kiel *Flandrio*, [5] *Engadinio*, *Montenegro*, *Grenlandio*, *Holandio*, *Tirolio*, *Tonkinio*, *Javio*, *Hinduio*, *Palestinio*, *Kubio*, *Kanadio*, *Levantio*, *Madagaskario*, *Siamio* [nun: Tajlando], *Transvaalio* [iama provinco de la Respubliko Sudafriko; tiel kun -aa-], *Marokio*, *Sudanio*, *Tibetio*, *Turkestanio*, k. t. p.

La proponoj pri aliaj sufiksoj anstataŭ *Uj'*, kiel *J'* (Christaller, Leono Zamenhof, Mazzolini), *Ĝj'* (Huet), *Ij'* (Delanoue), prezentas proksimume la samajn maloportunaĵojn kiel la sufikso *l'*. La sufikso *J'* ebligus eviti la malagraban akcentitan *l*, sed ĝi igus multajn radikojn strangformaj kaj malfacile rekoneblaj, escepte eble por slavoj, eĉ tute ne prononceblaj, kiel *Angljo*, *Aŭstrjo*. La sufikso *IJ'* prezentus komprenoble la kunajn malbonaĵojn de *l'* kaj *J'*, sen ia ajn profito.

II.) Eceptante la riproĉon pri malsimpleco, oni povas fari al la dua procedo la samajn riproĉojn, kiel al la unua. Sro Hodler tute prave diras: „Estus tute arbitre formi ĉiujn landnomojn per la sufikso *UJ'*. Vortoj kiel *Holandujo*, *Kanadujo*, *Argentinujo*, pekas kontraŭ la principo de internacieco, ĉar en ĉiuj idiomoj la radiko de ili rilatas ne al la loĝanto, sed al la lando mem“; sed li ne atentis, ke tion, kion li malfavore diras pri la sufikso *UJ'*, oni tute egale devas diri pri ĉiu ajn alia sufikso, ĉu *J'*, ĉu *IJ'*, ĉu *EJ'*, ĉu eĉ *l'*. Vortoj kiel *Holandio*, *Irlandio*, *Islandio*, *Finlandio*, *Marokio*, *Kubio*, *Kongio*, k. t. p., tute ne estas pli internaciaj, nek pli akcepteblaj ol la egalvaloraj formoj kun *UJ'*.

III.) La tria procedo estas „simpla“ (Hodler), konforma al la efektiva etnografia realeco kaj al la instruoj de la historia scienco, kaj tre „alloga“ (Hodler). Jam antaŭ kelkaj jaroj Sro Rektoro Boirac klarigis, kiel principon, ke „ĝi estas la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero kaj ke la alia maniero, nomante primitive la nacion kaj devenigante la nomon de la lando por [tiel, legu: per] sufikso estas dua, akcesora, sekve, en okazo de dubo, neniam preferinda, ĉar la terloko nomas siajn loĝantojn“.

Zamenhof mem konsideris tiun ĉi sistemon, kiel la plej bonan, kaj proponis, ke „elektante por la landoj neŭtralajn geografiajn nomojn, oni senescepte oni uzu la derivadon per la sufikso *AN'*. Ankaŭ Sroj Privat, Aymonier, opinias tiun solvon la plej bona, se ĝi estas ĉiuokaze efektivebla.

Tamen ĝi ankaŭ prezentas malfacilaĵojn: ĉu *Germaniano, Turkiano, Hispaniano*, estas akcepteblaj vortoj? ĉu, akceptante formojn kiel *Danano, Polano, Hispanano, Grekano, Britano*, k. t. p., oni ne estos devigata preni duan malsaman radikon por signifi la landon, ĉar ŝajnas malfacile asigni la landan signifon al la vortoj *Dano, Polo, Hispano, Greko, Turko, Brito*.

Sed oni devas konfesi, ke formoj kiel *Svedo, Svedano – Norvego, Norvegano – Portugalano, Portugalano – Japano, Japanano – Franco, Francano – Egipto, Egiptano – Italio, Italiano – Hungario, Hungariano – Belgio, Belgiano – Holando, Holandano – k. t. p.* estus tute taŭgaj, el ĉiuj vidpunktoj.

IV.) La kvara procedo, kiu uzas paralele du aŭ eĉ pliajn sufiksojn aŭ vorterojn (*UJ', I', AN', UL', LAND'*), estas rekomendata de Sro Rollet de l'Isle; ĝi bedaŭrinde necesigas iom multajn apartajn regulojn, t.s. [tio signifas] esceptojn, kaj aliflanke ĝia konstanta severa precizeco estus en la komuna uzado ofte ĝena kaj malutila. Sro Norman Frost ankaŭ petas, ke oni diferencigu la sencon de *UJ'* (etnografia) kaj la sencon de *I'* (politika), sed tiaj delikataj diferencigoj koncernas pli la teknikan ol la komunan uzadon.

V.) La kvina ebla procedo estis proponita de neniuj, ĉar ĝi prezentas senutilan komplikon kaj la elekto de ambaŭ diversaj parencaj radikoj estus malfacila pro la malsameco inter la naciaj lingvoj. Tamen tia dueco de radikoj estus eble oportuna por kelkaj nomoj.

VI.) La sesan procedon proponas Sro Eyquem kaj certo [tiel –o] estas, ke ĝi estas la plej simpla el ĉiuj kaj prezentas multajn oportunaĵojn kaj igas pli facila la elekton de la radikoj. Ĝi estas tute konforma al la germanlingva kutimo, kiuj [legu: kiu] plej ofte diferencigas la landnomon je la popolnomo [ĝ] nur per malsama finiĝo: *Schweiz, Schweizer – Schweden, Schwede – Norwegen, Norweger – Polen, pole* [legu: *Pole*] – *Belgien, belgier* [legu: *Belgier*] – *Spanien, spanier* [legu: *Spanier*] – *Böhmen, Böhme*. Sro Eyquem proponas, ke oni diferencigu la landnomon je la popolnomo nur per respektiva substantiva aŭ adjektiva finiĝo. Tio estas iom simila al la franclingva uzado de adjektiva formo por signi la nacianon: *Français, Américain, Anglais, Espagnol, Italien* k. t. p. Tiamaniere ni ekzemple ricevus: *Franco* (lando), *Franca* (naciono); *Norvego* (lando), *Norvega* (naciono); *Sviso, Svisa*; *Perso, Persa*, k. t. p.

Oni povus ankaŭ pli simple uzi la substantivan finiĝon egale por la landnomo kaj por la popolnomo, diferencigante la sencon nur per la uzado aŭ neuzado de la artikolo kaj de la pluralo. Tiamaniere, nur per la sekso la Franclingvanoj distingas facile *La* kaj *Le Perse, La* kaj *Le Suisse, La* kaj *Le Corse*.

Tamen ni devas konfesi, ke tiuj ĉi ambaŭ procedoj ne taŭgas egale bone por ĉiuj radikoj. Anglo, Brito, Greko, Turko, Hispano, Polo, Dano ŝajnas, kiel mi jam diris, malmulte konvenaj por signifi landon, kaj estus malfacile trovi alian radikon, kiu egale bone taŭgas por landnomo kaj por popolnomo.

Mi konfesas, ke, komencante [ĉu preferu: komencinte?] tiun ĉi esploron sen ia antaŭjuĝo, mi sincere esperis, ke mi povus proponi precizan solvon de la problemo. Sed, esplorinte metode kaj detale la demandojn, kolektinte kaj komparinte la landnomajn radikojn en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kunmetinte proksimume kompletan liston de akceptindaj esperantaj landnomaj radikoj elektitaj laŭ la principo de internacieco, tiel ĝuste klarigita de Sro Rollet de l'Isle, prove aplikinte

ĉiun el la ses eblaj solvoj al ĉiu tia radiko aparte, mi estas devigata konkludi, ke nenia solvo estas plene kontentiga nek absolute kaj nediskuteble preferinda super la aliaj.

Sro Privat estis prava, antaŭvidante, ke „plena unueco ne estas facile atingebla, ĉar tio devigus ŝanĝon de multaj radikoj“, kaj ke oni povas diri pri la landnomoj tion, kion Sro Rollet de l'Isle, en sia majstra Konsilaro [16], diris pri la teknika kaj scienca lingvo: „Ni ne povas, kiel estus dezirinda, kaj kiel Esperanto ebligas fari, verki tute perfektan, laŭlogikan kaj laŭregulan lingvon, ĉar tia lingvo ne estus sufiĉe internacia; kaj ni ne povas enirigi en Esperanton, kiel ĝiaj principoj ebligas tamen fari, ĉiujn internaciajn terminojn, ĉar, tiel farante, ni neniigus la grandan plisimpliĝon, kiun donas al la lingvo la metodoj de formado de la kunmetataj vortoj.“ [17]

Nur la ĝenerala praktika uzado povos definitive decidi pri la afero, unue elektante inter la diversaj sistemoj tiujn, kiuj prezentas pli da bonaĵoj kaj malpli da malbonaĵoj kaj esceptoj ol la aliaj, kiuj estos kredeble iom post iom forĵetataj. [18]

La Lingvaj Institucioj siaflanke devos plenumi gravan rolon, zorgante, ke oni ne malatentu la konsilojn de Zamenhof, ke oni respektu la spiriton de la lingvo kaj principe, ke oni konservu [tiel, legu: konservu] ĝian elastecon kaj flekseblecon. Fako estas, ke multaj esperantistoj malfavore emas preferi rigidecon kaj severan logikecon ol liberecon kaj alasiemon [tiel, legu: allasiemon].

Tial oni tro facile parolas pri danĝera ĥaoso en multaj okazoj, kiam temas nur pri libereco kaj facileco, kiu, dum ĝi ne malhelpas la kompreneblecon kaj la klarecon, estas tute sendanĝera kaj neĝenanta [19]. Ni ne forgesu, ke Zamenhof konstante malrekomendis troan severecon kaj rigidecon, kiuj ne estas konformaj al la spirito de la lingvo, nek al la leĝoj de la homa intelekto, nek al la bezonoj de la vivanta praktiko.

Mi esperas, sinjoro Prezidanto, ke vi opinios, same kiel mi, ke estas taŭge komuniki mian raporton kun preciza demandaro al niaj Akademiaj Kolegoj.

Via tre sindone

E. Grosjean-Maupin.

Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro.

[La raporto ne havas indikojn de la precizaj fontoj de l' citaĵoj.] [20]

IV. Kelkaj komentoj pri la Raporto

- 18 Sekvas kelkaj koncizaj notoj pri la Raporto el la vidpunkto de la Fundamento (kies devigajn regulojn ĝi lezas en preskaŭ ĉiu alineo). Detalojn kaj profundigojn pri ĉiuj komentoj oni trovas en BK I en la ĉapitroj „Bulonja Deklaracio“, „Antaŭparolo“ kaj „§ 15 Gramatiko“. Kiel tuto la Raporto taŭgas kiel instru-materialo, kiel AdE *ne* argumentu kaj laŭ kiuj metodoj ĝi *nepre ne* laboru.
- 19 [1] La taskigo estas malpreciza kaj neklara, GROSJEAN-MAUPIN misinterpretas ĝin. Tasko de AdE ne estas (kaj en 1922 ne estis) verki studon pri tio, kiel oni *teorie povus* solvi la landnoman problemon, sed kiel FdE *ja praktike solvis* ĝin.
- 20 [2] Tio estas metode malĝusta. Ĉiuj necesaj principoj jam estas interkonsentitaj, nome en la Bulonja Deklaracio (BD 1905) kaj la Antaŭparolo al la Fundamento (A 1905). Se tiuj „leĝoj“ (tiel 14-foje en A!) ne liveras solvon, AdE *devas* esplori, ĉu ekzistas „silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj“ (A 2.1). Se ankaŭ tio ne helpas, ĝi *devas* serĉi en suplementaj fontoj, ĉefe do en la verkaro de Zamenhof (BD 4.6, A 3.6) kaj – se ankaŭ tio ne helpas – ĉe la „plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj“ (BD 3.2). Tiu metodo estas *deviga* (A 11 kun BD 4). La Raporto

plenumas *neniun* de tiuj *necesaj* paŝoj. Ĝia metodo estas kontraŭfundamenta kaj ĝiaj rezultoj pro tio povas esti nur hazarde ĝustaj.

- 21 [3] Landnomoj staras „ekster la Fundamento“: Tio estas malĝusta kaj metode la *plej grava miso farebla*. La demando temas pri *lingva ĝusteco* de iu grupo de vortoj en Esperanto. FdE do estas aplikebla kaj aplikenda al ĝi, „por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio [t.e. en ĉiu lingva demando, do ankaŭ en la demando de landnomoj] sin gvidi“ (A 3.3). – Estas ofta artifiko nei la aplikendecon de FdE aŭ aserti, ke ĝi pri iu demando ne havas solvon, por malfermi la pordon al ĉiuspecaj „privataj“ (A 3.3 – A 3.5) preferoj kaj „personaj kapricoj“ (A 1.2).
- 22 [4] La sola (malpreciza) referenco al FdE aperas nur en piednoto (!), dum ĝi devus esti la elirpunkto de ĉi tiu analizo. GROSJEAN-MAUPIN aludas la lastan frazon en § 40 de la Ekzercaro (FE): „La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19]“ kaj multajn pliajn trafojn pri lando / landano en FdE, ekz. ĉe –*uj* en UV kaj FE (Turk' – Turk'uj'), en FE 26.5 kaj 26.6 (Mi vojaĝas en Hispanujo / en Hispanujon) k.t.p.
- 23 [5] Malklara kaj malpreciza aludo al § 15 FG (R 15) pri la „vortoj fremdaj“, en la neoficiala traduko de Zamenhof el 1903, „t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto“. – La lingvaĵo, la terminoj, kiujn uzas BD kaj A estas tre precizaj kaj bone difinitaj. AdE uzu ilin, kaj evitu nebulajn esprimojn kiel „internacieco“.
- 24 [6] „teŭtona“, „longeco“, „malbeleco“, „malinternacieco“: Ĉiuj tiuj kriterioj estas eksterfundamentaj. Ĉar ili laŭ MEAZZINI forpuŝu kaj anstataŭu la kriteriojn, interkonsentitajn de la esperantistoj kaj dokumentitajn en BD kaj A, ili estas kontraŭfundamentaj.
- 25 [7] Neniu el tiuj ĝeneralaj asertoj havas iun rilaton al la sole konsiderindaj kriterioj de FdE (la „ideoj“ de A 11 kun BD 4). La Fundamentaj kriterioj estas ĉiam konkretaj kaj rekte aplikeblaj. Nebula lingvaĵo kiel en tiu alineo estas forta indico, ke iu argumentas per eksterfundamentaj kriterioj kaj valoroj.
- 26 [8] Malpreciza kaj en si kontraŭdira priskribo de la metodo, laŭ kiu oni aplikas R 15 pri la „vortoj fremdaj“. Ĝi krome ne harmonias kun la supra aserto, ke landnomoj staras ekster FdE.
- 27 [9] „La historia scienco kaj la etnografio“: Tiaj konsideroj havas neniun rilaton al la demando de lingva ĝusteco de iu vortgrupo en Esperanto. FdE simple ne referencas al tiuj sciencoj, sed solvas demandojn de lingva ĝusteco laŭ siaj propraj valoroj kaj instruoj.
- 28 [10] „facileco“: Facileco estas eksterfundamenta kriterio (!), ĉar ĝi ne estas rekte aplikebla kaj kaŭzas senfinajn disputojn (facila por kiu? – ĉu por eŭropanoj aŭ por japanoj, ĉu por fakuloj aŭ por nefakuloj? k.t.p.). Eviti tiajn disputojn tamen estas la plej prioritata celo de FdE (A 1.1, A 3.6, A 10.1 kaj multloke).
- 29 [11] „reguleco“: Reguleco en la senco, en kiu ĝi estas uzata tie ĉi (laŭeble nur unu regulo, laŭ kiu oni kreu la nomojn de landoj kaj landanoj) estas eksterfundamenta. Jam en FdE laŭ stato de 1905 estas modeloj por du metodoj: ruso → Rusujo, Varsovio → Varsoviano. Ĉu nur unu regulo estus „dezirinda“, ne gravas laŭ la valor-sistemo kaj la jam faritaj decidoj de FdE. Provo atingi unuregulan sistemon, estus reformo, kies „efektivan necesecon“ por la praktiko devas elmontri la reformemuloj laŭ A 9: „Sed en la *praktiko* ni [...] devas kompreneble esti *tre singardaj* kun ĉia « perfektigado » de la lingvo: a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazo de efektiva *neceseco* ...“ (A 9.2-3 – kursivoj en la originalo).

- 30 [12] „la plej aŭtoritataj nunaj lingvistoj“: Ofta, tamen misa referenco al iuj eksteraj famuloj. Prave ZAMENHOF skribas en la Antaŭparolo: „la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li [Z], sed al tiu ĉi libro [FdE]“ (A 3.3). Prioritate ne gravas, kion prof. MEILLET asertas, antaŭ ĉio gravas, kion la esperantistoj interkonsentis en la Fundamento. MEILLET cetere eĉ ne estas „bona esperantisto“ en la senco de A 10.2 („ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la *fundamenton* de nia lingvo“), do ne „aŭtoritata“ pri lingva demando de Esperanto.
- 31 [13] „Utiligante la supre diritajn gvidajn rimarkojn“: **Resume**, neniu el ili iel gravas el la perspektivo de FdE aŭ eĉ estas rekte kontraŭ ĝi. La analizo baziĝas sur – laŭ FdE – preskaŭ komplete malĝustaj aŭ maltaŭgaj premisoj, kriterioj kaj valordecidoj kaj pro tio povas nur hazarde doni ĝustan rezulton.
- 32 [14] „sekvis Zamenhof“: Ĝuste, sed pli grave: daŭre en 1922 sekvas FdE, kp. supre: „la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li [Z], sed al tiu ĉi libro [FdE]“ (A 3.3). – Grava miskompreno de la (deviga) normhierarkio, kreita de BD kaj FdE: La verkaro de Z estas nur suplementa fonto, se ĝi efikas unuecige: La verkoj de Z estas „nur verkoj *privataj*, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel *modela*, sed ne kiel *deviga*“ [A 3.6]).
- 33 [15] *Novo vocabolario Esperanto-Italiano* (Nova vortaro Esperanto-itala) kun antaŭvorto de Giuseppe Peano. San Vito 1922.
- 34 [16] Rollet de l'Isle, Maurice. Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj. Raporto starigita de la Scienca kaj Teknika Komisio de la Scienca Asocio Esperantista. En: Internacia Scienca Revuo 1910:7:83, p. 279–295. – Kp. la mencion en la cirkulero de CART supre.
- 35 [17] Trafa priskribo de la antogonismo, kiun Ak Rüdiger EICHHOLZ, posteulo de ROLLET DE L'ISLE sur la posteno de la direktoro pri la Teknika Vortaro, en 1985 resumis per la demando „Ĉu internacia ne-reguleco aŭ ne-internacia reguleco?“ (AkSt 1985, p. 183-192). Ĉar tiel estis en la epoko de Z kiel same nuntempe kaj estontece, FdE prave allasas ambaŭ vojojn samrange, tiujn de vortoj fremdaj (R 15) aŭ tiun de kunmetoj laŭ R 11.
- 36 [18] „elektante inter la diversaj sistemoj“: Ne, tiun elekton la esperantistoj jam faris en 1905, aprobante FdE (!).
- 37 [19] „ne malhelpas la kompreneblecon“: GROSJEAN-MAUPIN kantas la rimaĵaĉon „neniu form' erara, se la senco estas klara“. Ĝi estas kontraŭa al la „leĝaro“, nomita FdE: „Tiuĵn ĉi tri verkojn [FG, FE kaj UV] la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ *konscie*) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj“ (A 2.2 kaj ankoraŭ 12 similajn fojojn en la dek unu mallongaj alineoj de la Antaŭparolo!). Se GROSJEAN-MAUPIN skribas (en sia antaŭa alineo) „ke oni konservu“, ĉiu facile komprenas, ke li intencas „konservu“ – la malglataĵo „ne malhelpas la kompreneblecon“. Eraro ĝi tamen estas. Tion ni scias, ĉar, laŭ la interkonsento de la esperantistoj, FdE dokumentas „ĝustan“ Esperanton. Persono, al kiu demandoj de lingva ĝusteco ne estas gravaj („egalas, ĉefe ni komprenas nin“), simple ne estu Akademiano, ĉar ties ĉefa tasko estas konsili pri ĝuste tiu *ĝusteco*.
- 38 [20] Mankantaj fontoj: Eble ne kunsenditaj de CART por ne tro ŝveligi la leteron, eble neniam notitaj de GROSJEAN-MAUPIN (?). Konsiderante la tiuepokan koncepton de „scienca“ laboro, la lasta ebleco ŝajna pli probabla.

V. Diskuto pri la Raporto en la Akademio

39 La diskuto estas protokolita de CART sur folioj 7 kaj 8 (en multe malpli akurata kaj pli malfacile legebla manskribo).

[7] Dum la voĉdonado de la Akademianoj, Dro PRIVAT petis de la Prezidanto, ke li aldonu al la Demandaro la du sekvantajn demandojn, ilin mi [CART] sendis al ĉiuj Akademianoj, petante ilian voĉdonon.

1.) Ĉu vi konsilas oficialigi jenan rekomendon de Rektoro BOIRAC: [1]

„Ni ne provis solvi la malfacilan demandon pri la plej bona maniero formi la nomojn de popoloj kaj landoj; tamen ni starigis la principon, ke la ĉefa kaj la plej ĝenerala maniero estas nomi primitive landon kaj devenigi la nomon de ĝia[j] loĝantoj per la sufikso *-an*, kiel ekz. *Eŭropo Eŭropano*, - *Islando Islandano*, - *Parizo Parizano* – k. t. p. kaj ke la alia maniero, t. e. nomante primitive la genton aŭ nacion kaj devenigante la nomon de la lando per la sufikso *-uj*, kiel ekz. *Franco Francujo*, *Germano Germanujo* estas dua akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda. Nur kiam ekzistas efektive gentoj, nacioj, havantaj propran historion, nur tiam oni povas diri, ke la popolo nomas sian landon, kaj uzi la duan procedon; sed en ĉiuj ceteraj okazoj estas pli ĝuste diri, ke la terглоbo nomas siajn loĝantojn; kaj pro tio ŝajnas al ni [Boirac], ke ekster Eŭropo kaj kelkaj partoj de Azio kaj Afriko, ĉie aliloke, nome en Ameriko, oni devas formi la nomojn per la unua procedo. *Brazilo*, *Ĉilo* [tiel, ne *-io*], *Peruo*, *Meksiko*, *Kanado*, k. t. p. ne estas laŭ nia opinio, loĝantoj de *Brazilujo*, *Ĉilujo*, *Perujo*, *Meksikujo*, *Kanadujo*, sed kontraŭe landoj, kies loĝantoj estas *Brazilanoj*, *Ĉilanoj*, *Peruanoj*, *Meksikanoj*, *Kanadanoj*, k. t. p. Ni do tre deziras, ke ĉiuj Esperantistoj konsentu pri tiu ĉi regulo: En okazo de dubo oni ĉiam preferu la sufikson *-an* al la sufikso *-uj* por formi la nomojn de popolo kaj de landoj.“ [2] [3]

[Certe ne tre klare estas redaktita la lasta frazo. Ne konflikto ekzistas inter *-uj* kaj *-an*. *An* oni uzas nur por regnaroj de lando, kies landnomo ne devenas de la loĝantoj. – La alia parto de la paragrafo estas konforma je la Zamenhofa sistemo kaj sekve ne bezonas specialan oficialigon. Ni ne tro oficialigu! Th. C.] [4]

2.) Ĉu vi konsilas akcepti jenan proponon de D^{ro} Privat:

A. La L.K. konstatas, ke ekzistas en la Fundamenta Zamenhofa Esperanto [5] tre diversformaj landnomoj laŭ modeloj *Rusujo*, *Finnlando* [tiel *-nn-*], *Bolivio*, *Kanado*, ktp. [tiel], sed ke plena unueco ne estas facile atingebla, ĉar tio devigus ŝanĝon de multaj radikoj. Tamen pli da ordo kaj reguleco estas dezirindaj. Tial la L. K. rekomendas ĝeneraligon de la principo BOIRAC: Transskribante land[n]omojn en Esperanto oni preferu ĉiam internacian kaj klaran nomon de la terloko sen iu ajn speciala sufikso, nur zorgante, ke oni ne povu konfuzi tiun nomon kun tiu de gento. (Ekz. *Franco* ne povas samtempe nomi landon kaj popolanon.) La nomojn de loĝantoj oni formas per sufikso *-ano*. Kiam ekzistas aparta gento aŭ nacio, tiam speciala radiko nomas la homon. Same kiel oni havas *filozofo* apud *filozofio*, *astronomo* apud *astronomio*, tiel same ni havas *Slovakio* apud *Slovakio*, *Skoto* apud *Skotlando*.

B. Oni povas, se oni deziras, distingi inter *Ruso* kaj *Ruslandano* aŭ *Turko* kaj *Turkiano* la popolano kaj la simpla regnaro, eble aligenta. Ankaŭ oni povas distingi inter *Turkio*, la regno, kaj *Turkujo*, la etnografia regiono, kie loĝas *Turkoj*.“ (Vidu Demandaron N^o 4 kaj 5). [6]

La gravan laboron de Prof. GROSJEAN-MAUPIN sendis, per rondiranta kajero la Prezidanto de la L. K. al ĉiuj Akademianoj escepte al S^{ro} EFSTIFEJEFF, kiun li ĝis nun ne povis atingi (*). Ĝi rekoltis ĝeneralan aprobon kaj indan laŭdon pro la granda laboremo, la scienco kaj la konscienco de la verkinto.

[Piednoto de la originalo:] (*) La leteroj por Rusujo ĝis lastatempe revenis senresponde aŭ ... perdiĝis. Ni esperu, ke post la Konferenco en *Genua* la rilatoj kun Rusujo fariĝos pli facilaj kaj pli regulaj. [7]

Inter la rimarkoj, kiujn ĝia legado okazigis, mi citos tie ĉi nur la plej gravajn: lu Akademiano rimarkas, „*ujo* malplaĉas al kelkaj por landnomoj: *Rusujo* = *ujo de Rusoj!* Ili do forĵetas tiun formon [8], sed morgaŭ, logike, ili devos forĵeti: *patrujo* = *ujo de patroj!* Kaj, prie, kiujn vortojn? ... glitiga, danĝereca vojo! [8]

D^o CORRET skribas: ... Ni havas lingvon, ni ne faras lingvon. ... [9] Solvon ni havas en la Fundamento. Ĝi estas leĝa por ni. Nur tion povas konstati la Akademio. Serĉi solvojn ĝi rajtas nur pri punktoj ne solvitaj de la Fundamento. ... En Esperanto la sufikso por landnomoj estas *-uj!* Intenca kaj teoria pekado ekzistas kontraŭ tiu ĉi regulo, sed nur parta kaj ne ĝenerala. Uzi alian „sufikson“ ol *-uj-* por landnomoj estas do peko kaj „eraro“ kontraŭ Esperanto ..., sed la Akademio ne povas ordoni, devigi aŭ malpermesi. Ĝi povas nur konsili. Ĉion ĝi devas toleri.

Same Prof. GROSJEAN-MAUPIN en siaj respondoj al la Demandaro: „... Toleremo nenion signifas flanke de la Akademio, ĉar toleri tion, kion oni ne povas malebligi, ne estas toleremo, sed deviga tolerado.“

D^o PRIVAT: „La rimarko 5a [10] pravigas la vidpunkton de Dro Zamenhof. Ĉar la gentoj kaj rasoj fariĝas pli kaj pli mito [11], la nomo de la lando devas esti la ĉefa, kaj sendependa. Tial oni klopodu nenion rompi kaj konservi la historion, antaŭvidante samtempe la estontecon. [12] Estas do tre bone, ke lando nomiĝu Ĉeĥoslovakio, ĉar ni povas tiel paroli pri Ĉeĥoj, pri Slovakoj, eĉ pri Ĉeĥoslovakoj kaj ankaŭ pri Ĉeĥoslovakianoj, se tion absolute deziras la germanaj loĝantoj de Moravio aŭ la Rutenoj subkarpataj. [13] La metodo Zamenhofs ĉiam estis konservi la akiritajn kaj nur aldoni bezonaĵojn flanke. Iom post iom la vivo paŝas de unu al alia.

Preskaŭ same S^{ro} KÜHNEL. [14]

S^{ro} WACKRILL tute prave diris: Se „regulas“ signifas, ke ĉiuj land- kaj popolnomoj devas esti formitaj laŭ unu solaj modelo, t. e. per unu konstant[a] sufikso (*uj*, *io*, *ejo*, *lando*; *ano*), tiam „reguleco“ estas nur ĥimero. Regulo tia ne estas aplikebla kaj nepre naskos senfinajn esceptojn, aŭ absurdaĵojn.

[Oni do ne riproĉu D^{ron} ZAMENHOF, ĉar li ne ĉiam uzis la de li mem donitan sufikson *-uj*, sed por Amerikaj landoj ekzemple uzas alian formon: *Kanado*, *Peruo*, Th. C.]

Niaj aliaj kolegoj pardonu, se mi ne citas tie ĉi iliajn, kvankam ofte tre interesajn, rimarkojn, sed ion novan ili ne alportas kaj pro multaj motivoj mi ne povas plilongigi tiun ĉi resumon de diversaj opinioj. Ĝin mi finos per tre trafaj vortoj de Prof. GROSJEAN-MAUPIN, kiuj klarigas kaj komprenigas la sintenadon de la Akademio en la landnoma demando.

Konkludo:

„La raporto sufiĉe pruvas, ke neniuj sistemo estas plene rekomendinda el la teoria vidpunkto. ... El tiu ĉi vidpunkto la fideleco al la ĝis nun ĝenerale akceptita tradicio estas pli sendanĝera ol ia ajn provo ...“ Th. C.

Demandaro kaj Respondoj.

- 1.) Ĉu silenti kaj ne plu pritrakti la demandon pri la landnomoj?
10 ne – 2 duboj = **Ne**
- 2.) Ĉu konsilinda la plena libereco?
11 ne – 1 dubo = **Ne**
- 3.) Ĉu konsilinda unu el la montritaj sistemoj?
10 ne – 2 jes (1. ej', 1. Boirac) = **Ne**
- 4.) Ĉu oficialigi la rekomendon de Rektoro BOIRAC?
8 ne – 3 jes – 1 duba = **Ne**
- 5.) Ĉu akcepti la proponon de PRIVAT?
9 ne – 3 jes = **Ne**
- 6.) Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia –uj? (*) [15]
9 jes – 2 ne – 1 duba = **Jes**

[Piednoto en la originalo:] (*) Tio, kompreneble laŭ la Zamenhofa sistemo, kiu ne koncernas la landojn, kies nomo finiĝas per *-lando* aŭ kuŝas ekster Eŭropo kaj Azio: *Irlando, Kanado, Peruo, Maroko* k. t. p.

VI. Kelkaj komentoj pri la Diskuto

- 40 [1] „oficialigi rekomendon“: La lingvaĵo, kiun uzas PRIVAT, kaj pro tio la demando estas malklara. Ĉu li vere celas, aldoni la rekomendon al la Fundamento? „Oficialigi“ en la specifa terminaro de FdE signifas doni al la rekomendo la statuson de laŭdifine „eterne ĝusta“ Esperanto (A 8 – regulo nova). – Probable ne. Kaj kial entute oficialigi kaj ne nur simple (ekster FdE) rekomendi? PRIVAT evidente ne pensas kaj argumentas en la (devigaj) kategorioj de la Fundamento.
- 41 [2] Fontindiko mankas. Ne estas kontrolebla, ĉu la citaĵo vere estas (en tiu preciza vortumo) tiu de la iama prez. BOIRAC, kiu mortis en 1917. – Tio ŝajnas ankaŭ ne tre probabla, estus almenaŭ nekutima por la stilo de BOIRAC ... malhonesta kaj ne fidinda argumentado, ĉu eble artifiko de PRIVAT por misuzi la renomon de BOIRAC?
- 42 [3] La propono estas kontraŭfundamenta, ĉar ĝi lezas la principon de klareco (kaj tial eĉ ne rajtus esti aldonita al FdE): „Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, ...“ (A 3.3). La principo de klareco estas aplikenda sendistinge al (devigaj) „reguloj“ kaj al „rekomendoj“. Tipa ekzemplo de rekomendo en FdE estas § 15.2 de la Gramatiko: „...sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur ...“.¹ Rekomendo premisas du „ĝustajn“ solvojn; al unu el ili estas donita prioritato. Malgraŭa uzo de la alia solvo tamen ne estas lingva eraro, sed nur „malpli bona“. La propono do devus klare elmontri la du ĝustajn eblecojn kaj esprimi favoron por unu el ili. Ĝi devas esti vortumita tiel klare, ke „ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi“ koncerne la demandon de ĝustaj kaj rekomendindaj nomoj de landoj kaj landanoj. Tia la (de PRIVAT asertita) propono de BOIRAC ne estas, ĉar ĉiu esperantisto devus (politike, historie, etnografie, do surbaze de eksterfundamentaj kriterioj) interpreti la svagan formulon „kiam ekzistas aparta gento aŭ nacio“ por decidi al kiu landnoma klaso iu vorto apartenas.

1

¹ Cit. laŭ la neoficiala traduko el 1903, kiun Zamenhof faris surbaze de la sole oficialaj versioj en la kvin referenc-lingvoj. Nia substreko.

- 43 [4] „Ni ne tro oficialigu!": La rimarko de Cart estas ĝusta kaj konforma al FdE kaj konsilo de Zamenhof (Lingva Respondo, LR 152 – 1910: „... ,decidojn' oni devas fari nur en okazoj de efektiva kaj senduba neceseco!" – aludo al A 9, vd. en BK VI). AdE en siaj rekomendoj pri landnomoj el 1989 kaj 2007 saĝe tiel agis ekster FdE.
- 44 [5] „Fundamenta Zamenhofa Esperanto „: Denove PRIVAT elmontras, ke li ignoras la (devigajn) kategoriojn de FdE, tie ĉi ties (devigan) norm-hierarkion: 1. BD, 2. FdE kun ĉiuj OA kaj la „ideoj“ de la Antaŭparolo, 3. la „stilo“ de Z, 4. la „bonaj verkistoj“. Tion montras liaj tuj sekvaj ekzemploj, kie li miksas la nivelojn: Dum „Rusujo“ estas Fundamenta (do laŭdifine „ĝusta“), la aliaj formoj estas aŭ „nur“ Zamenhofaj aŭ „eĉ nur“ de aliaj „bonaj esperantistoj“.
- 45 [6] PRIVAT tie ĉi do ne proponas „oficialigon de rekomendo“ (t.e. en FdE), sed rekomendon ekster FdE („... la L. K. rekomendas ĝeneraligon de la principo BOIRAC ...“). Laŭ la en 1922 aplikebla Krakova Regularo de 1912 (statuto), tiaj rekomendoj ne apartenis al la kompetenteco de LK, sed al tiu de nur AdE (vd. supre). LK devis nur decidi pri aldonoj al LK. Ne estas evidente, ĉu la propono jam nur pro statutaj demandoj estis ne allasebla. Ĉiuokaze ĝi enhave lezas la (devigan) principon de klareco (A 3.3), same kiel la unua propono de PRIVAT (vd. supre je [3]) – la kerna kondiĉo por distingi la du landnomajn klasojn estas „kiam ekzistas aparta gento aŭ nacio“. Tio ne estas rekte aplikebla sen plia difino, kiam la kondiĉo estas plenumita, kaj do fonto de estontaj „eternaj“ diskutoj inter esperantistoj. Ĉefa, unua kaj plej prioritata celo de la Fundamento tamen estas gardi la unuecon kaj do eviti tiajn disputojn, ĉefe se ili dependas de iuj politikaj aŭ filozofiaj mondkonceptoj (A 1.1 kaj multloke: „plena certeco, ke ĝi [la lingvo] neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj“).
- 46 [7] „Konferenco en *Genua*“: CART aludas al la Konferenco de Ĝenovo, kiu okazis, kiam li verkis sian cirkuleron, nome de la 10a de Aprilo ĝis la 19a de Majo 1922. Ĝin partoprenis 34 ŝtatoj, ĉiuj partoprenintoj de la unua mondmilito krom Usono, por restarigi la internacian financan kaj ekonomian sistemon. CART do esperas, ke la konferenco helpos plibonigi la rilatojn al la juna Sovetunio (de 1917), kiun li nomas „Rusujo“.
- 47 [8] Ĝentilmane kaj delikate CART ne donas la nomon de la akademiano (!), kiu „argumentas“ sur tia mizera nivelo.
- 48 [9] „Ni havas lingvon, ni ne faras lingvon.“: CORRET lojale memorigas pri la taskoj kaj memkompreno de AdE kiel difinitaj en la t.n. Dresdena Deklaracio (1908), vd. en BK IV. Ĝi nome estas ligita al Bulonja Deklaracio kaj Fundamento kaj ĝia tasko ne estas proponi reformojn.
- 49 [10] „La rimarko 5a“: Do sia propra (!), legu: „Mia, la propono de PRIVAT“.
- 50 [11] „Ĉar la gentoj kaj rasoj fariĝas pli kaj pli mito“: Anstataŭ argumenti per kaj surbaze de FdE, PRIVAT argumentas per sia persona politika ideologio. Mallojale li misuzas sian oficon de akademiano por „kontrabandi“ sian politikan konvinkiĝon en tiel „mondskue grava“ demandeto kiel la landnomoj en Esperanto.
- 51 [12] Tipa nenion dira slogano de politikisto – nur blabla', kiu estas neadekvata en serioza diskuto pri „ĝusteco“ de iu lingva detalo.
- 52 [13] „Ĉeĥoslovakio“: La ekzemplo ne estas hazardo; PRIVAT ideologie subtenis la novan ŝtaton kaj estis konato de ties unua ministro-prezidento Edvard Beneš (1884-1948). La antaŭjara Universala Kongreso de 1921 okazis en Prago. – La germanlingvaj civitanoj de la nova ŝtato formis minoritaton de ĉ. 25 % kaj kompreneble ne nur loĝis en Moravio, sed ankaŭ en la Bohema parto

(„sudetgermanoj“). – Estas saĝe, ke la Fundamento ne volas „importi“ tiajn politikajn kverelojn, se temas pri lingva demando.

53 [14] „Preskaŭ same S^{ro} KÜHNEL“: Malmulte surprize – KÜHNEL estis oficisto en la diplomacia servo de Ĉeĥoslovakio.

54 [15] „Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia –uj?“. La esperantaj gazetoj poste raportis esence nur tiun demandon kaj la respondon („jes“). La esperantistoj ne eksciis ion alian. Izolite, la frazo estas ne tre klara (A 3.3). Estus pli bone, se Cart vortumus rekomendon, kiu ankaŭ enhavas la klarigon el la piednoto kaj estus facile komprenebla, eĉ se oni ne konas raporton kaj diskuton. Eĉ pli bone estus rekomendoj pri ĉiuj unuopaj lando-landano-paroj (Ruso → Rusujo, Kanado → Kanadano), kiel prave postulis la Kongreso en 1924 kaj poste faris la rekomendoj de 1989 kaj 2009.

VII. Bazaj notoj pri la menciitaj personoj

55 Jen kelkaj tre koncizaj notoj pri la personoj menciitaj en la diversaj dokumentoj, prezentitaj tie ĉi (Cirkulero, Raporto, Diskuto) en alfabeto ordo. Per klako de la simbolo „[W]“ oni atingas la artikolon en la esperanta Vikipedio kun pliaj informoj.

Camille AYMONIER (1866-1951) [W], franca instruisto, esperanta gramatikisto, LK 1909, Ak. 1932.

Émile BOIRAC (1851-1917) [W], franca rektoro de la universito de Dijono, inventario de esperantaj vortoj („Plena Vortaro“ 1909-1910), unua prez. de LK (1905-1917) kaj de ĝia AdE (fondita en 1908).

Théophile CART (1855-1931) [W], franca lincea instruisto, diversaj lernolibroj kaj vortaroj por francoj, lingve konservema, energie kontraŭstaris Ido kaj reform-proponojn, sub la prezidanteco de BOIRAC direktoro de la Komisiono (poste Sekcio) pri la Komuna Vortaro, de 1920 lia posteulo. LK 1905, Ak. 1908.

Paul CHRISTALLER (1860-1950) [W], Ak., germana profesoro pri desegno kaj arto, i.a. verkinto de la germanaj AK kaj de progresema vortaro Germana-Esperanta 1910, 1923.

Pierre CORRET (1881-1936) [W], franca kuracisto, sekr. de SFPE (1908-1911), kunbatalanto de CART kontraŭ Ido reformoj kaj neologismoj, Direktoro pri la Teknika Vortaro (1920-1922), LK 1909, Ak. 1920-1936.

Georges DELANOUE, franco, ĉefdelegito de UEA por Francio en 1928. En Aprilo de tiu jaro li per cirkulero forte kritikis PRIVAT, esti samtempe redaktoro de la revuo *Esperanto* (UEA) (de 1920), prezidanto de la Centra Komitato (de 1923) kaj prezidanto de UEA (de 1924) (Delanoue-skandalo).

Nikolaj EFSTIFEJEFF (ĉ. 1865-?), franca transskribo de Евстифеев, en Esperanto kutime EVSTIFEJEV [W], rusa Esperanto-pioniro, aktiva jam ĉ. 1890, traduko de FdE al la slovaka, aktiva en Bulgario kaj Serbio. LK 1905, Ak. 1908.

Daniel EYQUEM (1852-1926) [W], franca supera juĝisto kaj prokuroro en *Limoges*, de 1906 esperantisto, en 1923 elektita prezidanto de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto (SFPE), ne membro de LK aŭ AdE.

Émile GROSJEAN-MAUPIN (1863-1933) [W], franca lincea instruisto, verkis la plej influ-havajn francajn Esperanto-vortarojn (ambaŭ direktoj) kaj surbaze de i.a. ili Plenan Vortaron 1930, el kiu fariĝis PIV 1970, 2002, 2005; direktoro KV 1920, LK 1909, Ak.

Hector HODLER (1887-1920) [W], svisa ĵurnalisto, kunfondinto de UEA kaj redaktoro de ĝia revuo *Esperanto* dum 13 jaroj ĝis sia morto.

- Horace HUET (1860-1911) [W], franco, prepara raporto por OA 1 (1907) kaj OA 2 (1911), prepara laboro por la vortaro Esperanto-franca de GROSJEAN-MAUPIN (1910), francaj AK, LK 1905.
- Eduard KÜHNL (1884-1966) [W], ĉeĥa oficisto de la ĉeĥoslovaka diplomatio servo, Esperanto-pioniro de 1900, diversaj Esperanto-vortaroj por ĉeĥoj, kandidato por LK en 1914, elektita post la unua mondmilito, Ak.
- Pierre Ernest MATTON (1855-?) [W], franca generalo, franca lernolibro 1906, LK 1905.
- Giacomo MEAZZINI [W], itala sacerdoto, vortaro Itala-Esperanto (¹1907, ²1912, ³1923), vortaro Esperanto-Itala (1922), kritikata pro sia nezamenhafa lingvaĵo jam en 1922, li baldaŭ poste transiris al Ido, fine proponis propran *Ido reformita* (1928), LK 1922.
- Antoine MEILLET (1866-1936) [W], la ĉefa franca lingvisto de la 20a jarcento, plurfoje elpaŝis pozitive pri Esperanto („*La ebleco institui facile lerneblan artefaritan lingvon, kaj la fakto ke tiu lingvo estas uzebla, estas demonstritaj en la praktiko. Ĉiu teoria diskutado estas vana. Esperanto funkciis, al ĝi mankas nur eniro en la praktika vivo.*“).
- Edmond PRIVAT (1889-1962) [W], franclingva svisa profesoro kaj ĵurnalisto, samlernejo de Hodler, ĉefred. de *Esperanto* (UEA) (1920-1934), prez. de UEA (1924-1928), idea subtenanto de Ĉeĥoslovakio, nove formita post la unua mondmilito.
- Maurice ROLLET DE L'ISLE (1859-1943) [W], franca inĝeniero de hidrografio, aktivulo pri scienca kaj terminara laboro, i.a. Marista Terminaro (1907), Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro (1931) k.a. Direktoro Teknika Vortaro de AdE (1922), Prezidanto de AdE (1933-1938).
- Herbert M. SCOTT (1884-1935) [W], usonana advokato, fakestro pri filatelio en la Sekcio TV de AdE, Filatela Terminaro 1928, LK 1926.
- Adela ŜEFER (SCHAFER, post la unua mondmilito angligite al SHAFER) (1869-?) [W], angla solkantistino kaj lingvoinstruistino, kunaŭtoro de la anglaj AK. LK 1905.
- Leono ZAMENHOF (1875-1934) [Z], juda kuracisto de unue rusa, poste pola ŝtataneco, frato de L.L. Zamenhof, red. de „Pola Esperantisto“ (1908-1913), korespondanto de AdE pri la pola lingvo, LK.
- Ludoviko Lazaro ZAMENHOF (1859-1917) [Z], juda okul-kuracisto de rusa ŝtataneco, kreinto de Esperanto.

VIII. Postparoleto

La „eternaj“ landnomoj – La „eternaj“ problemoj de la Akademio

- 56** La demando de nomoj de landoj kaj landanoj apartenas al la „eternaj“ diskutoj de Esperanto. La Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj (EBEA)² notas pli ol 200 (!) diskuterojn el la lastaj cent jaroj. Jam FdE ne estas tute kohera pri land-(an)nomoj („ruso“ – minuskle, sed „Turko“ majuskle). En la Ido-krizo Zamenhof dum mallonga periodo ŝanĝis sian pozicion. Jam en UK 3 (Kembriĝo 1907), LK kreis „subkomisionon“ por studi (i.a.) landnomojn. Raporto sekvis al raporto, listo al listo. Ĉion tion (detalojn vd. en BK I ĉe R 15 kaj en BK IV) GROSJEAN-MAUPIN ne aŭ nur rande konsideras. Lia Raporto ankaŭ ne alportis la deziritan sukceson. Nur du jarojn poste, UK 16 (Vieno 1924) rezoluciis, ke AdE rekomendu ne nur principon („restu ĉe *-uj* anstataŭ *-i*“), sed liston kun konkretaj unuopaj nomoj. Tiu deziro fariĝis realo per la Rekomendo de André ALBAULT nur en 1989 (!). Ĝi tuj spertis akran kritikon kaj kontraŭstaron. Nur 20 jarojn poste (en la universo de AdE rekorde mallonga tempo!) AdE en 2009 decidis pri reviziita rekomendo, preparitan de Bertil WENNERGREN. Malgraŭ iuj kritikoj (kiel povis esti alie?) ĝi ŝajne (?) estas pli-malpli akceptita. Prave, ĉar ĝi – se ne eksplicite, tamen fakte – sekvas la Fundamentan principon, ke pli ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera (!) plibonigo gravas tradicio kaj unueca uzado!
- 57** La batalon kontraŭ *-i*, CART kaj GROSJEAN-MAUPIN fine perdis. En 1974 AdE nuligis „ilian“ malrekomendon de *-i*. De tiam ambaŭ formoj denove „libere konkurencas“ kiel egale „ĝustaj“. En la praktiko de 2016, plej multaj lernolibroj kaj gazetoj uzas *-i*, plej multaj esperantistoj imitas tion, kvankam ekzistas la samaj bonaj argumentoj por *-uj*, kiel ili ekzistis en 1922. Sed jam Zamenhof konstatis: pli grava ol ĉiuj teoriaj konsideroj estas la praktiko.
- 58** Krom pro la lingva demando, la dokumentoj ĉefe ankaŭ estas interesa ekzemplo pri la „eternaj“ problemoj de la Akademio: Nur escepte (ekz. ĉe CORRET) oni trovas (eĉ ne precizan, sed ĝustan) aplikon de la Fundamento, al kiuj la akademianoj tamen – en 1922 kiel nuntempe – „kvazaŭjuris“ fidelecon. Granda parto de la argumentoj estas ekster- aŭ kontraŭfundamentaj (ekz. ĉe GROSJEAN-MAUPIN). (Movadaj) politikistoj kiel PRIVAT aŭ KÜHNL (mis-)uzas siajn postenojn en AdE por atingi iujn politikajn celojn, kiuj ne havas rilaton al (nur ŝajne) „simpla“, „pure lingva“ demando (pravigo de la tiam nova ŝtato Ĉeĥoslovakio per apliko de iu formo en Esperanto?!). Kun ioma kono de la Fundamento, oni tamen facile tuj ekkonas la banalajn ĝeneralaĵojn, tipajn por „belvortaĵoj“ de politikistoj, kaj tiel fremdaj al la Fundamento. – Instruo, same valida por eldiroj de „akademianoj“ de antaŭ 90 jaroj aŭ de la nuntempo.

Bernhard PABST

1

² Adreso: <http://www.esperantoland.org/ebea>.

La Esperanto-Akademio (⟨ea⟩)

Laŭ la preskriboj de la Antaŭparolo estis fondita „aŭtoritata centra institucio“ (ACI) por gardi la unuecon de Esperanto, ĝisdatigi („pligrandigi“) la Fundamenton kaj konsili pri „ĝusta“ Esperanto. De 1905 tiun taskon plenumis la *Lingva Komitato*, de 1948 la *Akademio de Esperanto* (AdE).

De kelkaj jaroj, plimulto de la nunaj „akademianoj“ ne plu agas „aŭtoritate“. Ili nome decidas kaj konsilas laŭ principoj kaj kriterioj aliaj ol tiuj de la Fundamento, aŭ eĉ propagandas kontraŭfundamentan varianton de Esperanto.³ Tiel ekestis la situacio, ke la esperantistoj nuntempe fakte ne havas oficialan aŭtoritatan institucion, servante al ili pri lingvaj demandoj. En la realo, la grupo nomanta sin „AdE“ estas nura cirklo de privatuloj en la senco de la Fundamento. Por kompensi tiun misan situacion ekestis la nova „Esperanto-Akademio“ (⟨ea⟩). Ĝi celas mildigi la neekziston de funkcia ACI per instrua kaj kleriga programo pri la Bulonja Deklaracio, la Fundamento kaj „ĝusta“ Zamenhofa Esperanto en la senco de tiuj dokumentoj.

En Preparo:

Berlina Vortaro de Mallongigoj de Esperanto (BVM).

La **Berlina Vortaro de Mallongigoj kaj Sigloj de Esperanto** jam nun notas ĉ. 1200 mallongigojn, siglojn, signojn kaj simbolojn, uzatajn historie aŭ nuntempe en la Lingvo Internacia. BVM indikas formajn variaĵojn kun iliaj precizaj trovlokoj, klarigas la mallongigojn, donas aplik-ekzemplojn en fraz(er)oj kaj klasifikas ilin laŭ kategorioj (ekzemple mallongigo de verko aŭ periodaĵo, de Esperanto-organizaĵo, el politiko aŭ komputilo-tekniko k.t.p.) BVM tial estos specifa suplemento al PIV. Ĝi aperu en 2016. Jen kelkaj specimenoj:

@ [komputilo] - heliko, volvita a; simbolo uzata en e-poŝta adreso (PIV 2005).

§ [juro] - paragrafo; kp. **art.**

& Ko. [komerco] - kaj kompanio: La eldonejo Hachette & Ko anoncis novan verkon.

p-ro [titolo] - pastro (Michalski 1991)

p-ro [titolo] - profesoro (ark., nuntempe → prof.): *Kun prezenta letero de s-ro p-ro Th. Cart.* (Fructier 1903).

p.B. [ĝenerala] - post Budho; kp. **a.B.**, **p.K.** (Vortaro Eo-Taja 2015).

P.B. [pseŭd.] - Paul Bennemann (1885-1954), germana Esperanto-vortaristo. [W]

P.E.S. [Movado] - Presa Esperantista Societo (Suchböchlein 1932). (hist.) lama esperanta presejo en Parizo, fondita en 1905, kiu eldonis multajn Esperanto-librojn. Moderna uzo kutime sen punktoj: PES.

PEA [Movado] - Portugala Esperanto-Asocio, fondita en 1925 (UEA). [W]

pl [gramatiko] - pluralo; sinonimo kun punkto: **pl.**; vd. ankaŭ: **sg**, **sg.**

PL [lando] - Pollando.

1

³ Tion montras ekzemple kaj i.a. la aktuala Statuto de 2016, la „Kromdeklaro pri la nomoj *Zamenhof* kaj *Vaŝington*“ (OI 22, 2013), la enkonduko al OA 9, multaj respondoj de la „Konsultejo“ kaj eĉ pli multaj opini-esprimoj de „akademianoj“ (inter ili eĉ estraranoj) en publikaj lingvaj diskutoj. Detalojn vd. en BK I.

Landnomoj 1922

La raporto „Pri la landnomoj kaj popolnomoj“ de Émile Grosjean-Maupin el 1922 neniam estis publikigita, sed kiel manskribaĵo sendita nur al la ĉ. 100 membroj de Lingva Komitato kaj Akademio. Unuafoje ĝi nun estas facile konsultebla de la esperanta publiko. Esence ĝi rekomendas, rezigni pri landnomoj je *-i* kaj daŭre uzi tiujn je *-uj* (*Francujo* anstataŭ *Francio*). La klarigoj donas informojn pri la agintaj personoj kaj la historiaj cirkonstancoj en la 1920aj jaroj. La komentoj koncentriĝas je tri aspektoj: La „eterna“ landnoma diskuto, la (mal-)konformeco de la prezentitaj argumentoj kun la Fundamento de Esperanto kaj la ĉiama problemo de la Akademio, ke iuj membroj malfidele misuzas ĝin por aliaj celoj ol por nuraj sobraj decidoj pri tio, kio estas lingve „ĝusta“ en la senco de la Fundamento. La prilaboro tial taŭgas kiel instrumaterialo, kiel la Akademio *ne* laboru – ne en 1922 kaj ne en nia epoko. Ĝi suplementas la sepvoluman verkon „Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto“ (BK) de la komentinto kaj turnas sin al instruistoj, progresintaj lernantoj, historiistoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri ‚ĝusta Esperanto‘.

Pri la aŭtoro

Émile Grosjean-Maupin (1863-1933) estis franca licea instruisto, kaj membro de la Akademio, verkis la plej influ-havajn francajn Esperanto-vortarojn kaj surbaze de i.a. ili Plenan Vortaron 1930, el kiu fariĝis Plena Ilustrita Vortaro 1970, 2002, 2005.

Pri la komentinto

Bernhard Pabst estas juristo kaj vivas en Berlino. Li publikigis multajn detal-studojn pri la Fundamento, verkis i.a. bibliografion de la vortaroj en Esperanto kaj daŭre laboras super la sepvoluma Berlina Komentario pri la Fundamento (BK).